



(bildo: Jaroslav Matuška)

25 jarojn instruado en la trafikaltlernejo Pardubice

La unusola trafika altlernejo en la tiam Ĉeĥoslovakio nomata „Trafika Altlernejo“ kun multaj trafikfakoj ĝis 1962 havis sian sidejon en Prago. Inter 1960 kaj 1962 ĝi translokiĝis al la slovak urbo *Žilina* kaj ŝanĝis sian nomon al „Trafika kaj Telekomunika Altlernejo en *Žilina*“. Ĝis la jaro 1993 tiu ĉi restis la sola trafika altlernejo en Ĉeĥoslovakio. En *Žilina* studis ĉiuj fervojistaj inĝenieroj kaj aliaj fakuloj ne nur pri fervojo sed ankaŭ pri telekomunikado, aero- kaj akvotrafiko. Multaj fervojinĝenieroj laboris kaj laboras ĝis hodiaŭ ĉe la tiamaj Ĉeĥoslovakaj Ŝtataj Fervojoj (ČSD) kaj poste Ĉeĥaj Fervojoj (ČD). Ankaŭ multaj de niaj ĉeĥaj kaj slovakaj fervojistoj esperantistoj (IFEF-anoj) studis ĉi tie.

Post la dividiĝo de Ĉeĥoslovakio la 1-an de Januaro 1993 la ĉeĥaj studentoj (inkluzive la aŭtoron de tiu ĉi artikolo) subite estis eksterlandaj studentoj ...

La unuaj paŝoj por fondo de trafika altlernejo en Ĉeĥio estis farataj jam en la dua duono de la jaro 1991. Jam en tiu ĉi tempo estis evidente, ke Ĉeĥoslovakio ne restos plu komuna ŝtato. Kelkaj ĉeĥaj profesoroj do kreis laborgrupon por fondo de trafika altlernejo en Ĉeĥio.

Post multnombraj intertraktoj kun estroj de la altlernejoj en Prago, *Plzeň*, *Ostrava* kaj *Pardubice* la grupo elektis la plej bonan kaj konkretan ofertan de la rektoro de Kemi-teknologia altlernejo en Pardubice. Kune kun la urbestro li ofertis interalie ankaŭ loĝejojn por estraj profesoroj alvenontaj el *Žilina*.

La solena inaŭguro de Transportfakultato *Jan Perner* okazis la 26-an de Marto 1993.

Ĝi senprokraste komencis sian agadon kaj en vintra semestro 1993-1994 eklernis tie ne nur la novaj studentoj en la 1-a instruaro sed ankaŭ proksimume 70 studentoj alvenintaj el *Žilina*. Prelegis ĉi tie ĉirkaŭ 20 profesoroj kaj iliaj asistantoj.

Nuntempe la Transportfakultato *Jan Perner* havas 7 katedrojn kaj centron por trafika instruado kaj esplorado. Entute tie studas 1.200 - 1.500 studentoj (inkl. la eldistancajn studentojn) en la bakalaŭra, magistra kaj doktora programoj. Oni povas studi multajn fakojn, ekz. transportekonomion, loĝistikon, teknologion kaj regadon de fervoj-, ŝoseo- kaj aerotrafiko, konstruadon kaj bontenadon de veturiloj, konstruadon de trafikvojoj k.a. Laboras ĉi tie ĉirkaŭ 90 instruistoj / esploristoj. La fakultato disponas ankaŭ pri filio en Prago, kie lernas ĉefe eldistancaj studentoj kaj okazas aliaj aranĝoj por fakuloj (trejnadaj, seminarioj ktp.).

La regulojn de fervojtrafiko oni instruas en la katedro por teknologio kaj regado de fervojtrafiko. Studentoj lernas kaj praktikas interalie priservadon de diversaj tipoj de regejaj instalaĵoj (elektromekanika, relajsa, elektronika) en la „Trafiksalono“. Studentoj povas partopreni profesiajn trejnadojn kaj post la profesiaj fakaj ekzamenoj ili rajtas labori (samtempe kun studado) kiel trajnekspedistoj, trajnkondukistoj k.a.

Karaj gelegantoj: Ĉu vi studis (studas) en iu trafika alt/lernejo? Skribu ankaŭ vi pri tiu ĉi lernejo.